



11

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

NOVEMBRO 1963

ENHAVO

	Paĝo
* * * Por modela organizo de la abonigado	1
Steponas Vi'niauskas. Ĉe la bordo de Danubo (versaĵo)	2
Georgo Deŝkin. Nia amo (versaĵo)	2
Ŝinka Flaretova. Kien vi rapidas (versaĵo)	2
Violin Oljanov. Pri la Esperanta verso	3
Atanas D. Atanasov — Ada. Dudek-tria leciono	6
Radoslav Tričkov. Kvardekjara senĉesa sukceso de nia „Sukceso“ en Vraca	7
JUNULARO SUR POSTENO	9
TRA LA GAZETARO	9
RIDO SANIGAS	10
* * * Belarta konkurso de UEA 1964	12
D-ro Boris Nedkov. Por bulgara Esperanto-muzeo	13
Adolf Holzhaus. Unuaj bulgaraj esperantistoj	14

Abonkotizo : jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2 lv 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo : 0,15 levoj por cm² ; korespondanconoj : 5 stotinkoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23, Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5

SOVETUNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul 52/54 kv. 19, Moskva, B—162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.

POR MODELA ORGANIZO DE LA ABONIGADO

Multfoje ni skribis pri la signifo de la esperanta gazetaro kaj speciale de la asocia organo „Bulgara Esperantisto“ pri organizo kaj disvastigo de nia movado. Tamen en la praktiko ne ĉiuj estraroj kaj aktivuloj komprenis tiun grandan signifon. Ankoraŭ troviĝas eĉ estraroj, kiuj ne abonas nian gazeton. Tiam sintenon ni plu ne devas toleri. Nun la tasko estas, ke ĉiu esperantisto — malnova kaj komencanta ricevu kaj legu nian asocian organon „Bulgara Esperantisto“. Ju pli multe da legantoj, des pli vasta kaj organizita movado, des pli forta asocio.

Nun oni abonigas samkiel la pasintan jaron per REP. Sed estus granda eraro se la societoj restus flanke de la kampanjo, se ili lasus malorganizita la aferon, laŭ la bontrovo kaj meminiato de la apartaj esperantistoj. La Esperanto-societoj devas esti motoro de la tuta kampanjo. Ni esperas, ke havante la sperton de la pasinta jaro la societoj bone organizis la varbadon de abonantoj. Nun kiam alproksimiĝas la templimo, oni devas esplori kaj analizi la rezultojn. Se necese korekti iujn mankojn, plifortigi la abonigan aparaton, plibonigi la propagandon. Ĝis la 20-a de decembro devas resti sen abono eĉ ne unu esperantisto — aktiva aŭ pasiva, membro aŭ ne, malnova aŭ nova, kursano aŭ aŭtodidakto.

Krom al „Bulgara Esperantisto“ kiu en la katalogo de REP havas n-ro 194, REP abonigas ankaŭ al „Paco“ (n-ro 195), „Internacia Ĵurnalisto“ (n-ro 196) kaj „Nuntempa Bulgario“ (n-roj 12 kaj 19). Ni rekomendas la abonadon kaj la abonigadon al ĉiuj ĉi gazetoj. Estas forte rekomendinde abonigi ankaŭ siajn eksterlandajn korespondantojn kaj amikojn.

De la disvastigo de nia presorgano „Bulgara Esperantisto“, de la bela ilustrita gazeto „Nuntempa Bulgario“ dependas grandparte la plua evoluo de la Esperanto-movado en nia lando, ĝia organiza forteco kaj aŭtoritato.



(soneto)

Mi ne povas prisilenti,
memorante la Danubon,
kie iam la batalo
bolis, kvazaŭ ond' furia.

Ĉu revidos mi Rusion?
Ĉu forpelos ni la nubon?
Ĉu min kisos panjo mia?

Ĉu silenti oni povas,
memorante la feliĉon,
dum forkuris de Danubo
la arme' german-faŝista,
dum ĉe la Danuba bordo
en vilaĝo riĉa ree
la bulgaraj vilaĝanoj
kantis kantojn de libero?

Mi en revo rememoras:
preter la Danuba bordo
pasis la vilaĝa vojo.

Bluokulaj belulinoj
ame faris florbukedojn
por donaco adiaŭa.

Ĉu mi povas ĝin forgesi?
La Danuba ter' bulgara,
kie sangon verŝis multe
la soldatoj rusaj bravaj,
kaj el tiu tero kreskis
floroj ruĝaj de papavoj.

Mi ne povas prisilenti
tion, kion kaŝas koro.
Pri knabino bluokula
ŝvebas kara rememoro,
kaj mi sentas nun ankoraŭ,
ke ĉe la Danuba Bordo
restis part' de mia sango,
de la amo kaj de l' vivo.

Steponas Viŝniauskas—USSR

BULGARA POPOLKANTO

Kiel perloj falas pluvgutetoj,
la ĉevalon selas la amato —
iras gajni li en Rumanion.
Mi al li parolas, lin petegas:
— Restu dum ĉi jaro, ho amato,
restu dum ĉi jaro kaj ĉi vintro!
Oni povas ĉiam gajni monon,
sed nur foje estas la juneco,
estas kiel roso ĝi, amato:
estas je maten', forestas tage.

Tradukis: *Vasil Slavov*

Finigis maj', monato de ripozo
por mia ozi', sed ne por nia am' —
neniam estingiĝos ĝia flam',
ĉar estas ĝi nek trompo kaj nek pozo.

Ne gravas, ke pri ĝi parolas jam
ni ne per versoj, sed per simpla prozo —
simile al sorĉado, al hipnozo,
ĝi regas nin, kaj iĝis vivornam'!

Vi scias ja, ho mia Maja Floro,
kiel al vi sin tiras mia koro,
kiel mi ĉiam revas pri kunest'!

Ho, baldaŭ realiĝos iluzio —
ne en Aŭgusto, sed jam en Julio
atendas nin renkonto, ama fest'!

1960.

George Deŝkin

KIEN VI RAPIDAS

Kien vi rapidas
knabine? petola?
Kien vi rapidas
en la vivo sola?

Vin la zorg' kaj ĝojo
akompanas ĉiam,
sed la ĝustan vojon
perdos vi neniam,

kvankam en la vivo
strange io tentas,
ofte la deklivojn
vi ne priatentas.

Vi sur vojon brilan
jam elektis glorie,
ĉar la vojmontrilo
estas via koro.

Kaj la kor' ne trompas
en am' ne perfidas,
ĉiujn barojn rompas,
kreas, ne insidas. . .

*Ŝinka Filaretova
Asenovgrad*

PRI LA ESPERANTA VERSO*

Plej karakteriza apartaĵo de la verso estas **la ritmo kaj la rimo**. En la termino versa ritmo oni komprenas regulan alternadon de akcentaj kaj senakcentaj silaboj. La ritmo de la esperanta verso estas silaba-tonika, t. e. baziĝas sur la alternado de konstanta nombro da senakcentaj silaboj inter la akcentaj. Oni distingas la jenajn ritmajn piedojn:

Jambo — konsistas el unu senakcenta kaj unu akcenta silabo.

Ho, mi/a kòr', / ne bà/tu mál/trankví/le,
El mí/a brùs/to nùn/ ne sàl/tu fòr'!

(Zamenhof)

Trokeo — unu akcenta kaj unu senakcenta silabo.

En la/mòndon/vénis/nòva/sèntp. . .

(Zamenhof)

Daktilo — estas trisilaba piedo kun akcento sur la unua silabo.

Kíal, ho/kíal fa/líĝas la/hèrbo, ver/dànta sur/kàmpo. . .

(V. Langvet)

Amfibrafo — estas trisilaba piedo kun akcento sur la dua silabo.

Tra dènsa/ nebúlo/ brílètas/ la cèlo. . . (Z).

Anapesto — estas trisilaba piedo kun akcento sur la tria silabo.

Ŝi silèn/tas senmò/ve (Z).

Tre ofte renkontiĝas senakcenta silabo en la loko de akcenta.

Ho, mí/a kór', / ne bà/tu mal/trankví/le!

Tie ĉi la silabo *mal* estas senakcenta, sed dank' al la ritma impulso ĝi akceptas ritman akcenton.

Kelkfoje renkontiĝas mala kazo — akcenta silabo staras en la loko de senakcenta. En tia okazo la akcento perdiĝas.

La kàmp' ès/tas larĝa/ kaj rèkta/la vòjo (Z).

Tie ĉi la akcento de *estas* perdiĝas.

Oni renkontas ankaŭ miksitajn ritmajn piedojn.

Fòrte/ ní stàru/ fràtoj/ amàtaj
por nia/ sànkta/ afèro!
Ní ba/talàdu/kùne/tenàtaj
per ùnu/ bèla/ espèro!

(Zamenhof)

Ĉi supre ni havas harmonie alternantajn dusilabajn-horeajn kaj trisilabajn-amfibrahajn piedojn. Tio aldonas apartan fortecon de la sento, firmecon de la alvoko. Similmaniere oni povas fari diversajn kombinaĵojn.

* El la preta por preso Gramatiko de Esperanto.

La ritmo necesigas elizion de la artikolo *la* (ellaso de la vokalo *a*) kaj de substantivoj (ellaso de la finaĵo *o*). Sur la lokon de la ellasitaj vokaloj oni metas apostrofon. La ceterajn partojn de la parolo kaj substantivojn en akuza-tivo oni ne povas elizii.

Rimoj. Krom la ritmo grava signo de la verso estas la rimo. **Rimo** oni nomas la sonan ripetadon de la lasta akcenta silabo en la verso kaj post ĝi. Iuj misinformitaj homoj opinias, ke en Esperanto oni facile skribas versojn, ĉar ĉiuj substantivoj finiĝas je *o* kaj ekzistas regulaj sufiksoj, per kiuj oni povas rimi. Tio absolute ne akordiĝas kun la vero. La ri-petado de sama finaĵo tute ne estas rimo. Plej esenca karakterizaĵo de la rimo estas ripeto de la vokalo de la akcentita silabo kaj ja en Esperanto la finaĵoj ne estas akcentitaj. La rimoj, formitaj de samaj sufiksoj, nomataj **adasismoj**, estis ofte aplikataj de Zamenhof kaj la unuaj Esperantaj poetoj: *soifanta* — *militanta*, *dividitaj* — *disbatitaj*, *laciĝos* — *efektivigoj*, *difinita* — *elektita*, *hardita* — *signita*, *senmoveco* — *infaneco*, *laborado* — *batalado*, *rozet'* — *infaneĵ'*, ktp. Tiuj rimoj jam ne estas rekomendataj, ĉar ofte ripetigas, kreas monotonecon kaj ne atingas la celon.

El la dirito estas klare, ke la aserto pri facila rimado de la esperantaj versoj estas senbaza. Kontraŭe, en Esperanto pli malfacile estas troveblaj bonaj, neŝablonaĵoj rimoj, ĉar la radikoj estas malmultaj. Pro tio precipe ĉe junaj kaj nespertaj poetoj renkontiĝas ofte ŝablonaĵoj rimoj: *espero* — *vespero* — *vero*, *mondo* — *rondo* — *ondo*, *sento* — *vento*, *baro* — *maro*.

Rimoj, en kiuj ĉiuj sonoj ekde la akcenta vokalo plu estas egalaj, estas nomataj **puraj rimoj**: *ardo* — *gardo* — *mardo*, *sento* — *momento*, *mano* — *rano*, *bildo* — *sildo*.

Al la plenaj rimoj ni povas kalkuli ankaŭ tiujn, en kiuj iuj konsonantoj diferencas nur laŭ voĉeco: kontraŭ voĉa konsonanto staras la koresponda sen-voĉa. Tio estas malpli rimarkebla, kiam la voĉa konsonanto staras antaŭ sen-voĉa, aŭ en la fino de la vorto: *gard'* — *mart'*, *bord'* — *kort'*.

Rimoj, en kiuj iuj sonoj post la akcenta vokalo ne kongruas, estas no-mataj **asonancoj**: *turmentaj* — *dentoj*, *flustr'* — *pus'*, *preĝejon* — *hejmen*, *tavoloj* — *laboro*, *ĉielo* — *Edeno*, *junaĝo* — *vestaĝo*.

La asonancoj disponigas grandan eblecon kaj variecon de rimado. Ili estas utiligitaj multe ne nur de la nuntempaj Esperanto-poetoj, sed ankaŭ de tiaj grandaj naciaj poetoj kiaj Majakovski, Tihonov k. a.

Superrimoj estas nomataj tiuj puraj rimoj, en kiuj kongruas sonoj ankaŭ antaŭ la akcenta vokalo: *bruo* — *truo*, *kristalo* — *pedestalo*, *deklami* — *reklami*, *stranga* — *altranga*.

Kunmetitaj rimoj estas rimoj, kiuj konsistas el pli ol unu vorto: *blon-dulin'* — respondu lin, per la moto — *perlamoto*, *posta horo* — *frosta koro*, *tiu ĉi* — *enviu ŝi*, *surdulin'* — *gardu lin*, *rabu min* — *albumin'*.

La situo de la rimoj en la versaĵo povas esti tre diversa. Plej ofta estas la rimado de la unua kun la tria verso kaj de la dua kun la kvara laŭ la skemo *abab*. Tio estas **krucrimo**.

En sonĝo principon mi vidis
kun vangoj malsekaj de ploro, —
sub arbo, sub verda ni sidis,
tenante nin koro ce koro.

(Hajne, trad. Zamenhof)

Para rimo estas la rimo de du najbaraj versoj laŭ la skemo: *aabb*.

Kun kora doloro eterne mi vidas,
ke tute senmove sur ringo vi sidas! . .
Rigardu jen ĉiam mi kuras pli alte
kaj tiel je vivo kontentas senhalte. . .

(*Devjatnin*)

Ĉirkaŭprenan rimon oni havas, kiam rimiĝas la unua kun la kvara kaj la dua kun la tria verso laŭ la skemo *abba*.

Flirtigis la militdemon'
avide la standardojn pompajn
tra la ruinoj kaj disrompoj
kaj ĉie sonas glava son'.

(*Smirnenski, trad. A. Grigorov*)

Mezrimon oni havas, kiam la unua duono de la verso rimiĝas kun la dua.

Tie jen post la salikoj eĥas pafoj malamikaj
kaj sangflamaj ondoj fajraj sin renkontas por batal':
tuj ekestas lukt' alarma kaj ektintas ŝtal' malvarma,
kunpuŝiĝo kaj denova kur' ĉevala tra la val'.

(*Smirnenski, trad. A. Lakov*)

El tiuj bazaj situoj de la rimoj oni faras multajn kombinojn. La elekto de iu aŭ alia speco dependas de la enhavo de la versaĵo, de la celoj, kiujn oni havas. La rimo kaj la ritmo ne havas memstaran signifon. Ili kontribuas al la ide-emocia efiko sur la leganton aŭ la aŭskultanton. Ilia esprimforto manifestiĝas nur en ligo kun la enhavo.

PRI „NUNTEMPA BULGARIO“

La leginda riĉe ilustrita monata gazeto „Nuntempa Bulgario“ aperas jam 8-an jaron. Ĝi spegulas la sukcesojn de nia popolo en la konstruado de la socialismo en nia lando kaj informas pri la progresado de la Esperanto-movado enlanda kaj internacia. La gazeto estas valora legaĵo por la lingva perfektigo de ĉiu esperantisto kaj grava helpilo en la internacia korespondado. Tial ni rekomendas abonigi ankaŭ la alilandajn korespondamikojn — tio kontribuos por la fortikigo de niaj rilatoj kun ili.

La gazeto publikigas senpage mal-

longajn anoncetojn pri internacia korespondado.

Abonojn al „Nuntempa Bulgario“ akceptas nur la filioj de REP ĉe la lokaj poŝtstacioj. La redakcio de „Nuntempa Bulgario“ NE akceptas abonojn. Reklamaciojn oni sendu same nur al la respektiva filio de REP.

Limdato de abonado al la gazeto por la jaro 1964 estas 20. XII. 1963. Abonkotizoj: por Bulgario 2,40 lv, por alilando — 2,52 lv, escepte de Albanio, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio, por ĉi tiuj landoj la abonkotizo estas 1,32 lv.

UNIVERSALA KONGRESO

Dudek-tria leciono

Jen fine la kongresurbo — la celo de nia longa veturado — estas proksima. Nia aro, kiu grandigis konstante ĝis nun kiel ruliĝanta neĝbulo, estas en granda ekscito.

La vagonaro haltas ĉe la stacidomo. Ĉio havas solenan, majestan aspekton. La fasado de la stacidomo estas abunde ornamita per girlandoj kaj grandaj esperantaj kaj naciaj flagoj. Sur la perono rapidas al ni junuloj kun verdaj brakbendoj. Tio estas lokaj gesamideanoj, kiuj bonvole prizorgas la alvenantajn kongresanojn kaj direktas ilin.

Antaŭ la akceptejo staras aro da samideanoj alvenintaj antaŭ ni.

Oni rapide servas ĉiun. Ĉiu ricevas siajn kongresajn dokumentojn kaj noton pri la destinita por li loĝejo. Organizo ideala!

Post kiam ni aranĝis nin en la loĝejoj, ni promenis tra la stratoj. Ili svarmas je verdsteluloj. Je ĉiu paŝo oni aŭdas esperantan parolon. Aperas iluzio, ke la tuta urbo estas loĝata nur de esperantistoj.

Interkoniga vespero. Mi kaj ges-roj Petersen eniras kune la grandan halon. Ni traŝovas nin inter la grupetoj de diverslandaj samideanoj. Niaj okuloj avide serĉas. Kiu estas tiu alteta juna sinjoro, kies rigardo vagas tra la salono kaj fine direktiĝas fikse al mi? Antaŭ ol mi komprenas, s-ino Petersen ekkrias: „Jen Thomson!“ — Vere li estis. Nun mi vidas, ke la reala vizaĝo similas la portreton. Kaj tamen la realeco estas iom diferenca.

— Kie estas Evelina?

— Sed ŝi serĉas vin en la amaso, akompanate de Rodrigues.

— Do, vi jam trovis lin. Nun restas Tanaka. . .

— Ho, bedaŭrinde ŝi ne povis veni. Mi parolis kun japana samideano, kiun ŝi komisiis averti nin. Li anstataŭos ŝin en nia kompanio.

Baldaŭ Rodrigues kaj Evelina, akompanate de malalta japana junulo, rimarkis nin. Sinceraj salutoj, manpremoj, interjekcioj. La du inoj sin ĉirkaŭbrakis kaj kisis.

La vespero pasis kvazaŭ en sonĝo. Belega, neforgesebla vespero!

Oni povas priskribi la okazaĵojn de la kongreso, sed ĉu oni povus transdoni skribe aŭ parole tion, kion travivas animo de esperantisto dum tiaj tagoj?

Unu vorto esprimus tion: feliĉo.

LA VORTFORMADO

Kiel en ĉiuj vivantaj lingvoj, tiel ankaŭ en Esperanto *la kunteksto* ludas gravan rolon por klara kompreno de la definitiva signifo aŭ nuanco de vorto. Tio donas eblecon eviti longajn, malsimple formitajn vortojn aŭ pezajn esprimojn. Ekzemple, anstataŭ *akiritaĵo* oni prefere uzas *akiraĵo* (ne difinante precize ĉu temas pri io akirita, akirata, aŭ akirota), kaj eĉ ankoraŭ pli simple — *akiro*.

Esperanto estas logika lingvo kaj ĝi havas eblecon por tre precizaj esprimoj, sed oni ne devas pedante uzi tiun ĝian kapablon kaj veni al matematika logikeco en ordinara apliko de la lingvo. Per tio la lingvo fariĝos senutile kaj senbezone malfacila, peza por uzado, kun longaj kaj deĉifrendaj esprimoj,

senigita de viveco. La emo al logiko estu racie modera, praktika.

En la komenca periodo de Esperanto la unuaj esperantistoj estis tre precizemaj kaj preferis formi longajn vortojn, uzante precizigajn afiksojn. Iom post iom la vivo venigis la uzadon de la lingvo al plia simpligo kaj praktikeco.

Iam oni parolis pri *interkonatiĝa vespero* dum la esperantistaj kongresoj; pli malfrue ĝi fariĝis *interkoniga vespero*, kaj jam eĉ *interkona vespero*. Al pedanta precizemo estas ŝuldata la nomo *Gejunulara ligo* (en Bulgario dum 1922), anstataŭ la pli mallonga, simpla, kaj tamen klare komprenebla *Junula ligo*.

Du fundamentaj principoj por la vortformado en Esperanto estas formulitaj: principo de neceso kaj principo de sufiĉo.

Principo de neceso: *En konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn kaj finaĵojn, necesajn por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan de tiu vorto.*

Principo de sufiĉo: *Se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekonfuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti elĵetata kiel neutila kaj nenecesa.*

Laŭ tio ni povas havi:

Via skribitaĵo estas malfacile legebla. — Via skribaĵo estas malfacile legebla. — Via skribo estas malfacile legebla.

EKZERCOJ

1. Klarigu la gramatikan karakteron de la radikoj **bez** kaj **neces**, konsiderante la sekvantajn ekzemplojn:

Estas bezone preni vortaron. — Estas necese preni vortaron.

Vortaro estas bezona (bezonata) por tio. — Vortaro estas necesa por tio.

Bezono de vortaro. — Neceso de vortaro.

Mi bezonas vortaron. — Al mi estas necesa vortaro.

(Ni ne povas diri: mi necesas vortaron, sed estas regula la esprimo: vortaro necesas = estas necesa).

2. Faru priskribon de iu via veturo.

KVARDEKJARA SENĈESA SUKCESO DE NIA „SUKCESO“ EN VRACA

Kvazaŭ ĝi estis hieraŭ. Tiel ŝajnas al mi. Ferminte okulojn, mi retrorrigardas kaj kvazaŭ sur filmbendo, vidas la triumfan marŝvojon de nia amata Esperanto-societo „Sukceso“. Preskaŭ 40 jaroj forpasis de tiu tempo, sed tiel klara, rekta kaj difinita, kvankam malfacila, estis la vojo irata.

Estis la 31-a de decembro 1923 jaro. Tuj post la fiaskinta glora Septembra ribelo. La faŝismo venkis kaj la tero ankoraŭ ne sorbis la abunde verŝitan sangan de la pereintaj martiroj kaj la fajro de la bruligitaj domoj ankoraŭ brulegis. Nigra nokto, nokto de ploroj, veado kaj larmoj, sternis sin super la suferanta Patrolando. Ekestis stagnado, timego, senespero kaj malbonaŭgura silento. Mi ĵus estis reveninta el la malliberejo, kie mi spertis la teruron de la senskrupula faŝismo. Kion fari? Mi estis perdinta por ĉiam mian instruistan postenon pro partopreno en la ribelo. Kion fari? Jen la demando, kiu ĉiam persekutis min. La solvo estis trovita. Malgraŭ la fera pugno de l' nova faŝista registaro, mi decidis malfermi kurson de Esperanto kaj, se eble,

fondi Esperanto-societon. Je la supremenciita dato, post longaj klopodoj kaj ruzado, mi sukcesis ricevi permeson por tio kaj kunvenigis pli ol 150 geentuziasmulojn, la plimulto el kiuj estis gejunuloj. La momento estis solena kaj la sukceso evidenta, tial mi decidis, ke ni nun fondu la societon, kaj poste organizu la kurson. Dirite — farite. Per aklamoj mia propono estis akceptita kaj la societo naskiĝis, ricevinte la belsonan nomon „Sukceso“, ĉar dum tiu ĉi periodo de tiranio kaj teruro, la naskiĝo de nova Esperanto-societo estis vera ŝanco kaj sukceso. La rezulto estis sukcesplena. La societo ekvivis, plivastigis, plifirmigis kaj ĝia marŝvojo antaŭen estis triumfanta. Ĝi fariĝis centro de la kulturkleriga laboro por la senrajtigita junularo en la urbo kaj fajrujo por progresema agado. La urbestro, tamen, ne fidis nin plene kaj ĝi ne malfruis kaŝobservadi nin, sendinte ĉe ni provokanton, sub la formo de kursano. Ni, tamen, eksciis tion ĝustatempe kaj estis tre atentemaj al li. Li lernis diligente la lingvon, ni traktis lin amike, kaj ĉiam ni sukcesis superruzi lin kaj ofte, sub diversaj formoj, ni eĉ igis lin oferi monon por la eksterleĝa Organizaĵo por Helpo de la Revoluciuloj, kiu funkciis tiutempe sekrete.

Kaj viciĝis tagoj, monatoj kaj jaroj de seninterrompa sukceso de nia „Sukceso“. La societo fariĝis ŝatinda organizaĵo por la progresema gejunularo, kiu vivis plensangan vivon en ĝi. Ni eĉ fondis turistan filion ĉe la societo kaj niaj regulaj turistaj ekskursoj ĉiam estis plej multnombraj, plej viglaj kaj plej preferindaj.

Nia societo jam havis firman bazon kaj akceptis aranĝi la 15-an nacian Esperanto-kongreson, kiu estis bonege vizitita, sukcesplena kaj riĉa per siaj rezultoj. Por erarigi la policon ni dum kelkaj jaroj elektadis por prezidantoj de la societo tute hazardajn personojn, eĉ neesperantistojn, kiuj ĝuis la favoron kaj la fidon de la loka administracio kaj flatitaj pro la „honoro“ akceptadis la postenon.

Agante tiamaniere ni povis preskaŭ senobstakle havi klubojn, aranĝi kursojn, havigi riĉan bibliotekon, publike propagandi, vaste korespondadi kun la tuta mondo kaj ricevadi grandan kvanton da progresemaj libroj kaj gazetoj. Kelkaj el ni sub pseŭdonimo eĉ kunlaboris en la eksterlandaj progresemaj gazetoj.

Pli malfrue ni sukcesis aligi nian societon al la loka kulturdomo kaj de tiam ĝis nun, ni laboras sub la protekto de tiu ĉi kultura organizaĵo, per kio ni gajnis bonan reputacion kaj aŭtoritaton. Nur sub ĝia aŭspicio ni aranĝis ĝis nun pli ol 50 publikajn kursojn en la urbo.

Post la venko de nia popolo en 1944 jaro kaj la starigo de la popoldemokratia registaro, nia societo libere ekspiris kaj ekiris la vojon de libera, plenrajta kaj viriĝinta organizaĵo. En 1949 nia societo denove akceptis kaj finpreparis la 32-an nacian Esperanto-kongreson, tamen pro certaj, ne dependantaj de ni kaŭzoj, ĝi ne okazis.

Nun nia societo ĝuas plenan liberecon, aktive laboras por la paco, kunlaborante kun la loka Packomitato kaj evoluas kiel vivanta organismo. Per sia aŭtoritato ĝi instigis nian lokan urbestron akcepti, helpi kaj kunlabori morale kaj materiale por la organizado de la 19-a internacia junulara Esperanto-kongreso en Vraca, kiu estis apogeo de nia glora marŝo al triumfo.

Radoslav Tričkov

POST LA KONGRESO EN VRACA

Delonge forsonis la viglaj kongresaj tagoj en Vraca. Bonŝancaj estis la esperantistoj en Vraca renkonti la partoprenantojn en la 19-a Internacia junulara Esperanto-kongreso. Kiom da multaj novaj amikoj ni nun havas en la mondo. Foriris la speciala vagonaro kun la kongresanoj, sed restis en niaj koroj la belega amikeco kaj la neforgeseblaj rememoroj.

La loka Esperanto-societo en Vraca organizis specialan postkongresan kunvenon, dum kiu detale raportis k-do E. Daskalov — vic-prezidanto de KK. Li substrekis la sukcesan ĝeneralan evoluon de la kongresaj aranĝoj kaj samtempe kritikis kelkajn esperantistojn, kiuj nesufiĉe helpis la organizadon de la kongreso. Oni esprimis dankon al ĉiuj urbaj instancoj kaj entreprenoj, kiuj aktive subtenis la kongreson kaj tute speciale al la urbestro—

UTILA INICIATO

Honore al la 48-a UK nia Esperanto-societo en Ĉirpan decidis organizi junularan laborbrigadon helpe al la agrikultura kooperativo en vil. Bratja Daskalovi. La 11-an de julio, 26 gejunulojn-esperantistojn solene adiaŭis iliaj gepatroj kaj ankaŭ la sekretario de la Kom-somolo — k-do Ivan Stoev.

Dudek tagojn laboris la junuloj en la mairaj kampoj por kolekti la rikolton kaj komplete pravigis la esperojn de la kooperativa estraro. Por sia bona laboro la brigadanoj ricevis ankaŭ salajron kaj estis distingitaj per specialaj insignoj. Plurajn horojn posttagmeze la junuloj utiligis ankaŭ por lerni kaj praktiki Esperanton sub la gvidado de Iv. Peev kaj de St. Stoev — instruisto, komandanto de la brigado. Ĉe la fino de la laborperiodo ni organizis du amuzvesperojn en v. Br. Daskalovi kaj v. Partizanin, kiujn ĉeestis ankaŭ la gepatroj de la brigadanoj, speciale invititaj.

Kiel bona rekompenco por ilia diligenta laboro, por la brigadanoj estis organizita ekskurso ĝis Sofio, kie ili parte ĉeestis la aranĝojn de la Universala Kongreso.

Ĉi-loke ni deziras esprimi nian koran dankon al k-doj Iv. Bataklijev el Plovdiv kaj P. Arnaudov el Pazarĝik, kiuj kuragigis nin ĉe tiu iniciato kaj sendis al ni materialojn por varigo de la esperantistaj aranĝoj ĉe tiu nia unua junulara esperantista laborbrigado en Ĉirpan.

I. P.

k-do Ljudmil Janĉev, dank' al kies iniciatemo kaj energio pluraj problemoj ĝustatempe trovis sian solvon.

K-do Radoslav Triĉkov — prezidanto de la societo raportis pri la 48-a UK en Sofio.

Ĉe la fino oni pridiskutis kaj akceptis decidojn, celantajn novan puŝon de la movado en la urbo kaj ĝismaksimuman profiton el la nunaj favoraj kondiĉoj por varbado.

E. Daskalov

VIDIN

La 15-an de septembro okazis organiza kunveno de nia E.-societo, dum kiu niaj delegitoj raportis pri la 48-a UK en Sofio kaj oni akceptis la novan trimonatan laborplanon. Ni jam melfermis la unuan kurson. La intereso pri la lingvo nun estas granda kaj ni esperas malfirmi kursojn ankaŭ por ĝelernantoj en unu gimnazio.

TRA LA GAZETARO

En j. „**Orjaĥovska Tribuna**“ — Orjaĥovo (13. VII. 1963) — versaĵo „Rememoro pri insulo „Esperanto“ de Orlin Orlinov kaj artikolo „Vigla agado de la esperantistoj en la urbo“ de St. Zlatarski.

En j. „**Naroden drugar**“ — Jambol (30. VII.) — artikolo „Nememorebla esperanta manifestigo“ (okaze de la 48-a Universala Kongreso de Esperanto) de Dimo Trudoljubov.

En la sama ĵurnalo (3. IX.) — artikolo „Glaŭko Pompilio—gasto de la esperantistoj en Jambol“ de Dimo Trudoljubov.

En la sama ĵurnalo (10. X.) — artikolo „Estas malfermita la lernoĵaro de la esperantistoj“ de K. Georgiev.

En j. „**Septemvri**“ — Stara Zagora (1. VII. 1963) — artikolo „La unua esperantista laborbrigado“ (en vilaĝo Bratja Daskalovi) de Bl. Dimitrov.

En revuo „**Turist**“ — Sofio (n-ro 9 — septembro 1963) — artikolo „48-a Kongreso de Esperanto“ de Stefan Stanĉev — pri la proksimeco inter la turistoj kaj esperantistoj — kun bildo de la turista domo „Esperanto“ sur Vitoŝa-monto.

BLINDULO

Donu ion al la blindulo. . .
Preterpasas virino kaj metas moneron en la manon de mizera blindulo.

- Do, la monero estas difektita.
- Kiamaniere vi povis rimarki, ja vi estas blinda?
- Mi ne estas blinda, mi nur anstataŭas blindulon.
- Do kie estas la blindulo?
- Li iris en kinoteatron rigardi filmon.

LI LACIĜIS

— Oh, mi laciĝis. La tutan nokton mi sonĝis ke mi laboris per falĉmaŝino. Nun dumtage estos necese ripozi!

MEM KOMPRENAS

Iris studento al instituto por plenumi ekzamenon pri plantkulturado. En ĉiuj poŝoj de sia vesto li havis notetojn. Por ne forgesi la lokojn de la notoj dum irado li kontrolis sin mem.

„Ĉi tie estas sekalo“, kaj li tuŝis maldekstran poŝon, „ĉi tie estas tritiko“, kaj li kaputis dekstran poŝon, „tie estas poligono“, kaj li tuŝis sian bruston.

Distre li prenis la ĉapelon de sur sia kapo kaj diris: „tamen ĉi tie . . . estas nenio!“

El rusa tradukis:

Sergeo Krolikov

TUTE NE DENOVE

- Denove vi vin kuŝetendis sur kanapon kun botoj?
- Do kial denove? Ja pasintfoje mi kuŝis kun ŝuoj.

ĜI NE ESTAS MIA

Ĉu estas konvene tiel neglekte rilati al via libro?

- Sed ĝi ne estas mia, mi prenis ĝin el la biblioteko.

DIAGNOZO

Kuracisto: Kiam hieraŭ vi havis paroksismon ĉu vi grincigis dentojn?

Malsanulo: Ne, ĉar miaj dentoj kuŝis sur la noktotableto.

LI SUPERRUZIS SIN MEM

Ĉe la stacio staras baldaŭ ekveturonta vagonaro. Pasaĝero eniras en vagonon. Svarmo da homoj. Nenia sidloko libera. Pensante tuj pri la artifiko, li malfermas sian valizon, fermas ĝin rapide kaj ŝajne emocia komencas serĉi ion sub la kanapoj.

— Kion vi serĉas? — demandas la pasaĝeroj.

— Serpento ĵus forkuris el mia valizo — respondis li, daŭre serĉante.

En kelkaj minutoj ĉiuj vojaĝantoj forlasis la vagonon, la ruzulo senĝene okupis tutan kanapon kaj kontente endormiĝis.

En frua mateno li vekiĝis kaj konstatis, ke la vagono estas staranta. Tra la fenestro li vidis fervojiston kaj demandis:

— Kial la vagonaro ankoraŭ ne forveturas?

— La vagonaro forveturis siatempe, sed ne la vagono, en kiu vi troviĝas. Ni dekretois ĝin, ĉar antaŭ la forveturo iu idioto perdis serpenton en ĝi.

INTER STUDENTINOJ



- Kia ŝajnas al vi la studado?
- Tre agrable — ĉiuj kolegoj invitas min al kino.

СИМВОЛ НА НАДЕЖДАТА

На 48-я световен есперантски конгрес

Зеленото е символ на надежда.
Избликне ли напролет резеда,
в очите на човека се оглежда
разцъфналия образ на труда:
зелените нивя са хляб насъщен,
зелените лозя — искрящ нектар.
О, те събудят смях във всяка къща
и труженика правят господар!

Зеленото е символ на надежда.
Сберат ли се есперантисти днес,
човечеството радостно поглежда
как зрел плода на гордия конгрес:
зеленото ни знаме е планета,
зелените звезди — небесна шир.
О, те разпалват дружбата заветна
и утрешния ден превръщат в мир!
Зеленото е символ на надежда!

4. 8. 63 г.

Иван Коларов



MODERNAJ FRIZUROJ



Pardonu min, sinjorino, se mi ĝenas vin.
Mi serĉas mian edzinon.

Titolpaĝo de la unua Esperanto-lernolibro en Bulgario

ABONU!

La templimo por abonado — 20. XII alproksimiĝas.
Ĉu vi reabonis?
Ĉu vi abonigis vian amikon?

Ni invitas niajn verkistojn konkuri en la Belarta Konkursio 1964, la dekkvina en la serio.

LITERATURAJ BRANĈOJ:

1. **Originala Poezio** (maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj).
 2. **Tradukita Poezio** (maks. 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj, tamen la komisiono rezervas al si la rajton fari escepton en tiu postulo, se temas pri traduko el ia literaturo — ekz. la japana — kies poemoj estas esence mallongaj).
 3. **Originala Prozo** (novelo, artikolo, aŭ simila; ĉiu prozaĵo po 2 000 ĝis 3 000 vortoj).
 4. **Originala Drameto** (ĉu per sceneja prezento, ĉu en formo de radiodialogo; maksimuma ludodaŭro 25 minutoj).
- Internacia komisiono juĝos la verkojn. La proklamo de la rezultoj okazos en tiucela kunsido dum la 49-a Universala Kongreso en Hago. En la sama kunsido oni laŭtleĝos el la premiitaj verkoj. Ĉiu premiito ricevos diplomon kaj monpremion. Por ĉiu branĉo estos po tri premioj; tamen la komisiono rajtas reteni premion aŭ premiojn, se ĝiaopinie la cirkonstancoj tion postulas.

Nova Talento: la komisiono ankaŭ aljuĝos diplomon kaj monpremion al tiu persono, kiu sendos la plej bonan verkon de verkisto premiita nek en tiu ĉi konkursio nek en la dek kvar antaŭaj.

ĜENERALAJ REGULOJ

1. Principe, ĉiu rajtas konkursi, kiu aliĝis al la 49-a Universala Kongreso aŭ kiu estas individua membro de UEA. Tamen, ĉe verkisto loĝanta en lando, kie plenumo de tiu kondiĉo estas ekstreme malfacila, oni laŭ bontrovo allasos konkursaĵon akompanatan de klarigo pri la cirkonstancoj.

2. La konkursa kotizo (sendepende ĉu oni sendas nur unu aŭ plurajn konkursaĵojn por unu aŭ pluraj branĉoj): por britoj — 1 ŝilingo 6 pencoj. En aliaj landoj, de kie oni rajtas sendi respondkuponon: 3 respondkuponoj maldekstre stampitaj de la poŝto (bonvolu kontroli tion) aŭ malfpli, laŭ la enlanda permeso. Por landoj, kie la sendo de respondkuponoj estas neebla, la partopreno estas senpaga.

3. Oni rajtas konkursi per maksimume tri (antaŭe en presformo ne aperintaj) verkoj en ĉiu branĉo. Ĉe branĉo 2 (tradukita poezio) oni zorgu eventuale pri la represa rajto. La premiitaj verkoj aperos laŭeble en la revuo „*Esperanto*“ aŭ en „*Monda Kulturo*“, kaj sen la permeso de la redaktoroj de tiuj organoj oni ne rajtas antaŭe aperigi ilin en alia gazeto.

4. La konkursaĵoj estu laŭeble maŝinskribitaj, kaj la komisiono aparte petas, ke oni sendu klarajn kopiojn, ĉar malklaraj kopioj multe malfaciligas la juĝadon. Oni sendu 4 ekzemplerojn de ĉiu konkursaĵo kaj en la traduka branĉo ankaŭ 4 ekzemplerojn de la originalo. Oni skribu sur ĉiu konkursaĵo la nomon de la branĉo, por kiu ĝi estas destinita. Oni ankaŭ skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon, kiu efike kaŝas la nomon de la aŭtoro. Oni skribu sian nomon kaj adreson sur aparta slipo kun la pseŭdonimo kaj kun aŭ sia kongresnumero aŭ membromarko de UEA. Eventuale, oni aldonu klarigon laŭ la senco de la dua frazo de regulo 1.

5. Oni sendu ĉion: konkursaĵojn, slipojn, eventuale respondkuponojn ktp, al la sekretario: S-ro William Auld, 20 Harviostoun Road, Dollar, Clacks. Skotlando.

La limdato por la ricevo de la konkursaĵoj estas la 31-a de majo 1964.

Karaj estraranoj! Tuj faru kontrolon, ĉu jam ĉiuj esperantistoj en la urbo (vilaĝo) kaj ĉiuj kursanoj abonis al BE! Dum 1964 ĉiu esperantisto devas ricevi nian asocian gazeton.

POR BULGARA ESPERANTO — MUZEO

Antaŭ kelkaj monatoj komenciĝis la kolekto de esperantaĵoj. Tio estas: libroj, vortaroj, revuoj, gazetoj, bultenoj, diversspecaj fotografaĵoj, memoraĵoj de kongresoj, konferencoj, dokumentoj, faldprospektoj, afrankitaj kovertoj el eksterlando, poŝtkartoj ilustritaj, esperantaj poŝtmarkoj kaj aliaj interesaj aĵoj.

Ĝis nun estas kolektitaj 265 diversaj esperantaĵoj, kio prezentas 1839 erojn. Inter ili estas proksimume 85 gazetoj kaj bultenoj diverslandaj, eldonitaj en la jaroj 1903—1963. Ni menciuj iujn malnovajn: Semo, Lingvo Internacia, Danubo, La bela mondo, Revuo Orienta, La ondo de Esperanto, Literatura mondo, La movado, Esperanto, Esperanto triumfonta k. a.

Pri la neceso kaj efektiviĝo de tiu iniciato ni ne parolos, ĉar estas memkomprenebla ĝia utilo, kiel nerefuteblaj estas la motivoj pri ekzisto de la muzeoj ĝenerale.

Por nia muzeo estas tre valoraj la memoraĵoj de niaj veteranoj forpasintaj, kiujn ni devas favore kolekti. Ekzemple: Ilija Silvestriev, Georgi Atanasov, Georgi Aktargiev, Trifon Hristoskov, Georgi Pândakov, Georgi Oreškov, Petr Jordanov, Panajot Kolev, Vasil Gaševski, Ivan Grozev, Hristo Haralambiev, Ilija Zlatev, Petr Toškov, G. Zografski k. a.

En nia laboro plej sukcese povas kontribui niaj malnovaj pioniroj. Tiel ni ricevas materialon por vera studado de la historio de nia Esperanto-movado.

Estas iuj malnovaj esperantistoj, kiuj ne povas facile disiĝi de sia Esperanto-pavaĵo. Al tiuj ni dankus, se ili povus almenaŭ postlasi leteron kun testamento, ke post ties morto la Esperanto-materialoj fariĝu heredaĵo de „Bulgara Esperanto-Muzeo“.

KANTOJ DE SOVETAJ KOMPONISTOJ

En Sovetunio aperis antaŭnelonge en Esperanto-kantaro „Kantoj de Sovetaj Komponistoj“. La libro havas 43 paĝojn kaj entenas 14 popularajn sovetajn kantojn kun notoj. La pli grandan kvanton de la kantoj tradukis la konata moskva esperantisto K. Gusev.

Ni varme rekomendas la kantarono al ĉiuj geesperantistoj. Oni povas aĉeti ĝin de la Bulgara Esperantista Kooperativo. La prezo estas 0.15 levoj.

VINTRA FERIO-SEMAJNO

Okazos „Vintra Ferio-semajno en Aŭstrio“ en la bela skiregiono de la „Rax-alpo“, Mal-supra Aŭstrio. La tempon ni elektis tiamaniere, ke facile la homoj sen foruzo de multe da libertempaj tagoj, povos partopreni dum la kristnaska kaj novjaraj festotagoj.

La dua arango estos „Postsemajnaj Tagoj en Vieno“ kaj ĝi okazos de 1-a ĝis la 4-a de januaro 1964. Ni esperas, ke kelkaj el la partoprenantoj de la unua arango volonte vizitus la proksiman ĉefurbon de Aŭstrio, Vienon.

dipl. ing. Schalk

La 15-an de oktobro 1963 mortis en Sofio la konata blinda esperantisto kaj Esperanto-poeto

DIMO KOLEV KIREV

Li naskiĝis la 22-an de junio 1903 en vilaĝo Stambolijski, regiono de Haskovo, lernis kaj finis la Ŝtatan Instituton por Blinduloj en Sofio. En la sama instituto li lernis Esperanton kaj en daŭro de multaj jaroj li instruis la lingvon al la blinduloj. Kolev verkis vervajn poemojn en Esperanto.

Niajn kondolencojn al la funebranta familio.

Ĉiujn kontribuajn por „Bulgara Esperanto-Muzeo“ sendu al adreso:

*D-ro Bo. is Nedkov,
str. Dim. Blagoev 35, Sofio*

UNUAJ BULGARAJ ESPERANTISTOJ EN LA NOMAROJ DE ZAMENHOF (daŭrigo)

5932. G. Beltcheff, Varna.*
5935. Stojan N. Kiljov. Kazanlik.
5944. Anĝel Hr. Kojuharov. Dobrič.
5947. A. D. Kovačev. Rusčuk, str. Luben Karavelov 28.
5948. Dontcho Georgieff. Kilifarevo, Tirnovska.
5953. L. D. Niagoloff, Terničani, Kazanliško.
5954. Dimitr Kostakev, telegrafisto. Philippople.
5955. Emanuil Rozental, ĵurnalisto. Philippople.
5956. Gavril Aranasov, Philippople.
5957. Ahmed Ihsan Feriddinoff. Philippople.
5958. Aleksandr Georgieff, oficisto de la banko. Philippople.
5959. T. J. Bačvarov, redaktoro de „Rodina“, Sofia.
5960. P. D. Mihajlova, reprezentantino de la gazeto „Moda i Domakinstvo“, Sofia.
5961. Stefan G. Dobroudjalieff, Sistov, Komerca lirnejo.
5964. Stojan Georgieff. Tchirpan.
5967. S. P. Bulgaranov. Plakovo, Tirnovska.
5968. Zahario Kolčakof. Tatar—Pazarĝiko.
5972. Velčo Todorov. Haskovo.
5973. D. D. Batchevaroff, redaktoro de „Ŝtastie“. Sofia.
5974. Hristo Stojkov, subhirurgo en la 3 pion. korpuso. Loveč.
5975. A. Lazaroff. Gorna Orehovitza, str. Dragoman Nr. 369.
5980. Panajot Dimitroff. Gorna Orehovitza, Nr. 252.
5981. H. Djeferoff. Tirnovo, kvart. Marino Pole.
5988. N. D. Kovatshef, redaktoro de „Svjet“. Roustchouk.
6086. Nikola M. Pekoff. Sistov, ul. Levska Nr. 2552.
6087. Penko R. Stojev, skribisto en la brigada administrado. Tirnovo.
6088. Alexandre Michailof. Ressain.
6089. Hristo Cačev. Pleven, Cifte-Kafene.
6090. George Nejhoff. Tchirpan.
6115. D. Jelev. Alfatar, distr. Silistria.
6116. Nikolo K. Zlatarov. Silfstria.
6117. Antono Georgiev, apotekisto. Silistria.
6121. Enčo Marinov. Silistria, selo Pandaklii.
6130. Metodo Iliev, lernanto de pedagogio. Lomo.
6131. S. Gančev. Sistov, Kniase-Mirska 1474.
6148. Fraŭlino Milka P. Petrova. Sofia, str. Rakovski Nr. 62.
6160. A. Karakolef. Sofia, str. Gladston Nr. 47.
6175. D. Petkof, subleŭtenanto. Stara Zagora, 12 p. Balk. polk.
6190. K. Filtchef. Roustchouk, 39 rue Pridunavska.
6193. Michel M. Arama. Salonique, Turkujo.
6200. Kostoff. Sistov, rue Nikolaevska.

* Ni publikigas la adresojn tiel, kiel ili estas skribitaj de la aŭtoro de la artikolo. Ni kredas, ke ili tiel estis publikigitaj de Zamenhof.

6339. Ĥristo Vasileff. Kazanlik.
 6240. Petr T. Peteff, telegrafisto, Kazanlik.
 6241. G. D. Paneff. Sliven, M. Dragojčeva Nr. 66.
 6242. Avram B. Anavi. Filipopoli.
 6243. Kosto K. Avramov. Pleven.
 6244. Kosto M. Mečkonov. Berkovitza.
 6245. Abato Garabet Sahagian. Filipopoli.
 6246. Gočo Iliev, mašinisto. Filipopoli.
 6247. Georgi P. Stefanov. Filipopoli.
 6248. Atanas Valavanakis, lernanto de l' greka ĝimnazio. Adrianopol, Turkujo.
 6249. Kristo Sivriev, Haskovo.
 6250. Angel Petrov, telegrafisto. Haskovo.
 6251. Todor Tenčev. Haskovo.
 6252. Emanuil S. Miltčev. Filipoplo—Sadova.
 6253. Dimitar A. Šopov. Kazanlik.
 6254. Ilarion Rajčev. Filipoplo.
 6255. S. Apostoloff. Kazanlik, rue C. Šišman Nr. 71.
 Ŝanĝitaj adresoj:
 5204. G. Athanasoff. Philippople, p. adr. A. Georgieff, directeur de la douane.
 Ripetitaj adresoj:
 2971. G. P. Oreškov, telegrafisto, sekretario kasisto de la klubo „Stelo“. Filipopol.
 4775. G. Štereff. Jambol, rue Samujlova Nr. 2.
Serio 23
 6582. Stanislav Karanof, instruisto. Kjustendilo, la parto „Copoliste“ 315.
 6584. Fraŭlino Penka, ĉe s-rino P. S. Stalinova, Kazanlik.
 6588. Elena Minčeva, instruistino, Dikilitaŝ, Razgrad.
 6589. Stančo Ĥaĝijohanoŝ, instruisto. Dikilitaŝ.
 6608. Anton Ĉavdarov, instruisto. Bosilegrad.
 6615. Ĥristo Atanasof. Kazanlik.
 6616. Petr Z. Bučkof. Koprivštica.
 6619. Georgi Nikolov. Lom.
 6620. Stefan Abaĝiev. Lom.
 6621. Treni Miladinov. Lom.
 6622. Ivan A. Kulín. Lom.
 6623. Gavríl Ivanov. Lom.
 6637. Kalčo Dimitroff, skribisto en la stabo de la 5-a Rezerva Regimento. Jaboly.
 6655. Teodoro Katranov, telefonisto. Roustchouk.
 6656. Rale C. Bojaĝiev. Koprivštica, Bit-Bazar, 11.
 6657. Zahario N. Leseff. Gorna Orehovitza.
 6686. Spiro Kmetof. Varna, Masinoto učilište na Flota.
 6687. Teodor Ĥristof Iljĉof. Razgrad, str. Princo Boriso.
 6693. Ivan Atanasoff, komercisto. Ĉirpan.
 6695. Ilia Gardeff, podporučik. Stara Zagora.
 6697. M. Boltaĝiov, instruisto. Vubel, Plevenski okr., Nikopolska okol.
 6699. A. P. Janakieff, lernanto. Constantinople, Chichli, Turkujo, Séminaire bulgare.
 6757. D. J. Rehajev, seminaristo. Constantinople, Chichli, Turkujo, Seminario bulgara.

6769. Dimitr Roussev, instruisto. Jamboli.
 6776. Enu St. Kakačev, instruisto, Kazanlik.
 6777. Stefan A. Šopoff, instruisto. Kazanlik.
 6778. Fraŭlino Marika A. Šopova. Kazanlik.
 6779. Fraŭlino Stefanka A. Šopova, instruistino. Kazanlik.
 6780. Jonko Davidoff, komercisto. Kazanlik.
 6862. Jurdan Georgiev Girinčev, 4 rota, 4 polk. Haskovo.
 6906. Georgi P. Vrabčev. Lom—Palanka.
 6911. Ivan V. Alexieff, instruisto. Jamboli.
 6994. Paskal Paskalev, Manala. Tirnovo, Asevova.
 7016. Jonko Davidov, komercisto. Silistra.
 7023. Denju Atanasov, studento. Loveč.
 7080. Parvan Jordanov. Lom, Str. Becova 2262.
 7081. Boris Kantarĝief. Lom, placo Ferdinand I, 1130.
 7082. Georgi A. Tchitacoff, gymnasiste, Kirk-Klisse, Turkujo, Mahala Djami Kebir.
 7084. Hristo Nikoloff, subleŭtenanto en 3-a Pionira Korpuso. Jamboli.
 7085. Anastasoff, subleŭtenanto en 3-a Pionira Korpuso. Jamboli.
 7092. Dimitr C. Kunev, komercisto. Bourgas—Aitos.
 7097. Hristo Totev Rjahovski. Gara Levski.
 7100. Mosko J. Moskoudij. Kavakli.
 7101. Hristo Hr. Čičiniadij. Kavakli.
 7138. Georgo Ivanof. Burgas.
 7144. Marko S. Saračef. Karnobat.
 7145. Athanas Entcheff. Aitos.
 7196. D. Iv. Vodeničarov. Bojurište.
 7203. Fraŭlino Doika B. Bijova. Kotel, Burgaski okr.
 7248. Nikola K. Tahav. Sofia, ul. Stranĝa 55.
 7249. Jur. Georgiev. Sofia.
 7253. Gančo Minčev, skribisto en la stabo de la 5-a Dunavska regimento. Ruščuk.
 7259. K. Jordanov, librotenanto en la Kaso Agronoma. Koula.
 7334. Petko Dacev. Gagovo, okol. Popovska, okr. Ŝumenski.
 7401. P. Spasov, studento-juristo. Sofia.
 7402. S. Petkov. Sofia, st. San Stefano 26.
 7451. Ivan Simoff. Progorelec, okol. Lomska.
 7680. Georgi N. Malinski, komercisto, Kumanovo, Eŭropa Turkujo.
 Saŝĝitaj adresoj:
 5571. Hristo Totev Rjahovski. Gara Levski.
 Ripetitaj adresoj:
 4774. Penko Petroff. Jambol, str. Knjaĵevska Nr. 31.

Adolf Holzhaus

(Usono)

„Bulgara Esperantisto“ estas bona novjara donaco por via eksterlanda korespondanto. Abonigu lin (sin)!

BULGARIO :

Dobran Enčev Dobranov, soldato, pod. 70410, **Burgas**, ĉt.

Dimitr Dobrev (27-jara), ul. Koprinarskaja 10, **Aseovgrad**, ĉt.

Ivan Georgiev Marinov, OTP „Toplivo“, Orjaĥovo, kun junaj (25—30) gesamideanoj el ĉl.

JUGOSLAVIO :

Slobodan Lazareviĉ (20-jara studento), ul. Vase Pelagiĉ 8, **Beograd**.

POLLANDO :

Władzimir Lipinski, ul. Traugutta 133/3, **Wrocław**, kun esperantistinoj el Bulgario (inter 24—32 jaraj).

Antoni Obloza, (17-lernanto), ul. Pekin 1 m. 8 voj. Katowicke urbo **Sosnowiec**.

Lucyra Javorska, Zielona Góra, Plac Stolarski 6, Dom Studenta.

USSR

Brose Aukštikalsiesse (instruistino), Birzli 18, **Pasvalys** Litovio.

Jurij Kotikov, Krivoj Rog-51, do vstrebovanija, Ukrainio.

La hungara samideanino, kiu posedas 32 esp. sondiskojn kaj petis min sendi litovan elĉerpitan esp.-sondiskon, kontraŭ „Hungara Vivo“. Bonvolu ankoraŭfoje sendi vian adreson al **Kaunas 6**, Nebeliunas Albinas.

La kamarado, kiu trovis dum la kongresaj tagoj fotoaparaton „Werra n-ro 104890/6805“ bonvolu sciigi pri ĝi la Redakcion de la revuo. Pri ĉi tio petas kamaradino Hedwia Wallesch el Blankenbora-Harz-Greve Str. 9.—DDR

MONTO-DOMO „ESPERANTO“

Post la finkonstruo kaj la inaŭguro de la esperantista monto-domo la estraro de la turista sekcio penegas trovi monrimedojn por mebligo de la domo kaj por aĉeto de la necesaj objektoj. Sen tabloj, seĝoj, litoj, matracoj, litkovriloj kaj kuireja vazaro oni ne povas utiligi la monto-domon. Pro tio kun danko ni kvitancis de societoj kaj esperantistoj-naturamikoj la jenajn sumojn :

Kolektita sumo ĉe la inaŭguro . . .	47.72 lv
Harold Toms, Dagenham, Anglio . . .	40
H. Holms — vicprezidanto de UEA . . .	25
Societo „Heroldo“, Sofio	30
Societo „Nigra Maro“, Burgas	25
Prof. Petr Dinekov, Sofio	25
G. Dumont, Vieno, Aŭstrio	15
H. Suurmans, Haarlem, Nederlando . . .	11.50
Dora Beneva, Sofio	10
Asen Grigorov, Sofio	10
Societo „Printempo“, Sofio	5

S-ro H. Holms, prof. P. Dinekov kaj S-ro Harold Toms pagis la fiksitan sumon kaj farigis kunfondintoj de la monto-domo. Ni esperas, ke baldaŭ ni povos anonci la nomojn de pluraj aliaj kunfondintoj. Ĉu ankaŭ vian nomon, kara leganto?

Sabate kaj dimanĉe la monto-domo estas je dispono de ĉiuj preterpasantaj turistoj. Oni povas ricevi teon, legi libron de la monto-doma biblioteko, ludi ŝakon ktp. Provizore pro manko de litoj nur kvar personoj povas dormi ene.

Ni serĉas dommastron por la monto-domo. La kandidatoj sin turnu al la sekcia estraro.

Turista sekcio „Esperanto“

Poŝtkesto 66, Sofio

Renkontu la novan jaron sen ŝuldoj: tuj abonu al „Bulgara Esperantisto“ kaj pagu la kotizon al la societo!

Ĉefredaktoro : Violin OLJANOV

Redakta komitato : Kiril DRAĴEV, Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: Delka Ĉolakova

Adreso de la redakcio : Sofio, poŝtkesto 66. Tel. 3-26-82

АБОНАМЕНТИ ЗА 1964

РЕП продължава кампанията за набиране на
абонати Начинът за абониране за

„BULGARA ESPERANTISTO“

и другите списания остава същият. Ръководствата
да вземат кочани от местните пощи и веднага да
организируют кампанията

Крайният срок е 20 декември !

РЕП приема абонаменти и за „Paco“, „Internacia ĵurnalisto“ и „Nuntempa Bulgario“
Номерата на есперантските списания в каталога на
РЕП са: 12, 19, 194, 195 и 196

Другари, не чакайте крайния срок! Да не остане
нито един есперантист, нито един курсист без на-
шия съюстен орган **„Bulgara Esperantisto“ !**

Излезе от печат

УЧЕБНИК ПО ЕСПЕРАНТО

от Иван Сарафов и Симеон Хесапчиев

V стереотипно издание

Цена 0,57 лв.

Доставя се от книжарниците на ДТП „Печатни
произведения“ и Българската есперантска коо-
перация